katolika sento

8 JARO 54a U.E.C.I.



KATOLIKA SENTO
BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)

Anno 54° - 1975

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI
AŬ PASTRO DUILIO MAGNANI
VIALE C. ZAVAGLI 73
RIMINI

Quota di abbonamento L. **2500**

Abonkotizo italliroj **2500**

KATOLIKA SEMEDO

n. 8

54ª Jaro Aŭgusto 1975

BONVENON AL LA GEKONGRESANOJ !

En la historio de nia IKUE ni havis jam rimarkindan nombron da kongresoj, kiuj vigligis la spiriton de nia movado: servi Kriston kaj la kredon pere de lingvo, kiu devas interfratigi ĉiujn popolojn. Tiuj kongresoj prezentis la kadron de la farita laboro kaj planis novan programon. Ankaŭ la nuna kongreso aspiras al tiu celo, esprimata en la temo: Renoviĝo kaj repaciĝo. Sed ĉi tiu disvolviĝas meze de tute apartaj cirkonstancoj unuflanke la Jubileo plenigas nian ĉijaran vivon kaj aga

don per la lumo de la dia mizeřikordo, dum aliflanke la monda materialismo, kvazaŭ nerezistebla fluo, klopodas treni la homaron al perdiĝo. Jen du opoziciaj kondiĉoj, kiuj kontraste altiras nin. Sed ni jam decidis: ni rifuzos la allogon de la malbono eĉ se necese, batalante kaj ni konfirmos kiel eble plej solene nian fidelecon al Dio.

Nia kongreso tion signifas, kaj tion celas.

Sed nun la Organiza Komitato devas agnoski, ke preskaŭ ĉiupaŝe ni renkontis ĉiuspecajn malfacilaĵojn. Ni opinias, ke verŝajne neniam ili estis tiel insistaj kaj tiel gravaj, kiel ĉifoje. Ni tamen ne cedis, fidante al la dia helpo, kiu per niaj oferoj povas pretigi al ni pli valorajn donacojn, kaj ni ne ŝparis fortojn por venki. Sed ni petas de ĉiuj niaj IKUE-anoj ne nur komprenemon, sed viglan kunlaboron por plifortigo de nia Asocio. Nur se ni estos unu laŭ lingvo, laŭ sentoj, laŭ kunagado, ni certe atingos la sanktajn celojn de nia amata IKUE.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ALIĜIS AL LA 36a IKUE-KONGRESO EN ROMO

307 Dazzini Mario
308 Petric Mica
309 Duranti Angelo
310 Harabagiu Gisela
311 Mihalyi Bernadette
312 Unyi Gisela
313 Nadi Ferenc
314 Nowak Leonard
315 Druszkiewicz Ludmila
316 Jaworski Mieczislaw
317 Lecki Ryszard
318 Vigar Norman
319 Foltynowicz Jozef
320 Merlani Mirella
321 Lorenzetti Pellegrino
322 Petar M.
323 Aldrighetti Maurizio
324 Lafargue Henri
325 Ostropolski Bruno
326 - 327 Daimo (geedz.)
328 Polerani Gianfranco
329 - 332 " familianoj
333 Bonaldo Bruno
334 Benda Hector

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ENTUTE, DO 334 EL 17 ŜTATOJ, NOME:

182 el Pollando; 80 el Italujo; 17 el Francujo; 9 el Nederlando kaj el Hispanujo; 7 el Hungarujo, Jugoslavio kaj Germanujo; 4 el Belgujo; 3 el Usono; 2 el Aŭstrujo kaj Britujo; 1 el Norvegujo, Rumanio, Ĉeĥoslovakio, Urugvajo kaj Argentino.

ROMA ESPERANTA VOCO
n° 142

ABONIS KS-on 1975 (6a listo):

Italujo: Chieti-Dopolavoro; Massa: O. Daimo; P. Lorenzetti; Milano: B. Pedron; S. Giacchino; L. Polerani; Mirteto di Massa: P. Scortini; Padova: G. Saggiori; Reggio E.: E. Paglia; Rimini: L. Scaparrotti; Romo: O. Lucas; F. Ragazzon; N. Giuliani; A. Lazzarini; Sotto il Monte: E. Marcetta; Tirolo: F. Knoflak; Verona: M. Aldrighetti; Vicenza: E. Professione; Francujo: R. Mauchien; A. Georget; F. Leeb; Hispanujo: S. Olivan; J. Bielsa; M. De La Fuente de Piquero; M. Piquero; Hungarujo: I. Ragomsa; I. Lupszki; I. Vàgò; Jugoslavio: M. Petric; M. Petar; Nederlando: A.M. Sinnema-De Vetten; Novzelando: J.B. Hamvai; Rumanio: D. Teleki; Pollando: E. Cieslik; J. Gilewska; J. Karolewicz; J. Smykalski; B. Poterucha; Z. Baran; Z.E. Rzeszutek; M. Bienkowska; C. Yedynak; S. Kozyra; H. Struska; E. Glabik; A. Janaszek; T. Haliszewska; H. Heine; J. Mamrot; M. Kosiaty; J. Marsalek; T. Klej; L. Nowak; R. Lecki; M. Jaworski; L.

Druszkiewicz; B. Moczulewska; J. Foltynowicz; Urugvajo: R. Zeballos Morales.

Entute: 483.

POR DAŬRE INFORMI ĉiujn aliĝintojn pri la kongreso, ni sendis volonte nian revuon Katolika Sento al ĉiuj aliĝintoj. Sed ĉar ĉi tiu celo ĉesis, de nun ni sendos Katolikan Senton nur al la abonantoj.

INTER LA KVAR SOLENAJ BEATIGOJ, kiuj riĉigos ĉi tiun Sanktan Jaron (19 de oktobro), tiu de la Servantino de Dio Maria Tereza Ledòchowska, aparte ĝojigos la katolikan polan nacion. Ni havos la esceptan ŝancon viziti ŝian benitan tombon, trezoron de ŝiaj spiritaj filinoj, loĝantaj proksime de S. Maria La Plej Granda, unu el la celoj de nia pilgrimado.

Grafino Maria Tereza Ledòchowska naskiĝis en Loosdorf (Aŭstrujo) je 29 de aprilo 1863. Kvazaŭ antaŭsentante la sanktecon de ĉi tiu infano, ŝia patrino skribis en sia notlibro: "Hodiaŭ estas la plej bela tago de mia vivo!"

Decidiga impulso al la misiista agado de la Servantino de Dio estis sukcesplena dramo kun kontraŭsklavecа celo, kiun Maria Tereza mem verkis, kiam ŝi estis dudektrijara.

Tiu fakte estis nur la komenco de intensa skriba agado, kiu instigis ŝin redakti pormisian revuon "Afrika Eĥo", kiu baldaŭ altiris, kunigis kaj formis fervorajn junulinojn. Tiel estiĝis la unua kerno de nova religia vivo, la instituto de Maria Tereza Ledòchowska, sub la nomo de la Misiistaj Fratinoj de Sankta Petro Claver.

Ne mankis opozicioj ekde la komenco. Sed la persisto de la Servantino de Dio ĉion toleris kiel signon de

la dia beno, kaj ĉion venkis. Unu el la plej doloraj estis la malaprobo, kiun donis al ŝi ŝia patrino Sefina, ne kapabla kompreni la "strangaĵojn" de Maria Tereza, kiu anstataŭ ĝui la gloron de la mondo, tiel favora al ŝi, revis pri afrikaj misioj! Nur kiam ŝia filo Vladimiro fariĝis jezuita pastro kaj per siaj manoj li komuniis la patrinon, la ursulaninan fratinon kaj Marian Tereza, Sefina repaciĝis plene kun siaj gefiloj. (Estas interese mencii: Vladimiro fariĝis la plej alta estro de la jezuita ordeno, ĝis sia morto).

Kvankam neniam la sanstato de Maria Tereza estis forta, tamen ŝi estis nelacigebla en siaj vojaĝoj por prelegoj, paroladoj, organizadoj favore al la afrikaj misioj. Ŝi mem agnoskis: "Mi spertas, ke Dio donas al mi supernaturan forton por ĉi tiu sankta entrepreno. Ni danku Dion por ĉiam!"

Religiaj domoj aperas unu post la alia. Unu el iliaj karakteroj estas eldonlaboro por la kredo. Al la "Eĥo de Afriko" aldoniĝis diversaj aliaj periodaĵoj, tiel konkerantaj, ke iu misiisto iam emfazis: "Ĉiu el ĉi tiuj katekismoj, libroj, periodaĵoj, konvertis almenaŭ dek animojn".

En la Sankta Jaro 1900 Maria Tereza ricevis el Romo la "Laŭdan Dekreton" pri sia religia institucio. La 3an de majo 1905 en ĉi tiu sama urbo, je via dell'Olmata, apud placo S. Maria Maggiore, oni inaŭguris la generalan hejmon. Kaj je la 7a de marto 1910 Pio 10a definitive aprobis la religian instituton: "Fratinoj Misiistaj de S. Petro Claver", nome la asocio, kiu hodiaŭ estas disvastigita laŭ 26 nacioj. La relikvoj de la Fondintino, kiu mortis la 6an de julio 1922, nun ripozas ĉe ŝiaj filinoj, sed el tiu tombo disradiiĝas al la Eklezio kaj al la mondo la misia pasio, heredaĵo de Maria Tereza Ledòchowska.

GRAVA DOKUMENTO pri ekumena kunlaboro estis publikigita de la Sekretariato por Unuigo de la Kristanoj je la 7a de julio, kvankam ĝi estis subskribita de Kardinalo Johano Willebrands, Prezidanto de la sama Sekretariato, jam de la 22a de februaro. Ĉar la 36a IKUE-kongreso estas fokusigo de nia kristana agado pere de Esperanto, ankaŭ laŭ ekumena vidpunkto, kaj tion konfirmas la oficiala invito farita al reprezentanto de la "Kristana Esperanto Ligo Internacia" (KELI), ni opiniias, ke informo pri tiu dokumento estas oportuna por nia movado. Ni fakte devas agadi laŭ ĉi tiu direkto, kun la fervoro dezirata de Kristo, kiu preĝis por nia unueco, sed laŭ la indikoj de la katolika Eklezio, por ke pere de tiu estu prilumata kaj orientigata al ni la ne ĉiam facila vojo.

En la unua parto la dokumento difinas la ekumenan taskon, pere de la papaj instruoj, kiuj reliefigas la precizan volon de Dio, kaj la esencan spiriton de la Eklezio, ĝiajn postulon kaj devon. Ĉi tiuj estas la dialogo kun la aliaj kristanoj, la kuna preĝado kaj la praktika kunlaboro por komuna kredatesto.

La dua ĉapitro pritraktas la temon pri la rilatoj de la loka Eklezio kun ekumenismo. La loka Eklezio - memorigas la dokumento - estas vivanta membro de la Universala Eklezio, unu, sankta, katolika kaj apostola, ĉar ĝi estas la videbla ĉeesto de Kristo animanta sian Eklezion sur la tero. Fakte, per la Episkopo, videbla kaj fundamenta principo de unueco en la loka Eklezio, ĉi tiu kuniĝas kun la universala kristeklezio; dum ĉiuj episkopoj kun la Papo reprezentas la tutan Eklezion en la kuneco de paco, de amo kaj de unueco. El ĉi tio devenas la nepra neceso, ke la ekumenisma agado estu sub la dependo kaj la gvidado de la episkoparo, precipe pri tio, kio koncernas la sakramentojn, por gardo de unueco en la kredo. Dum ĉiu Eklezio havas sian a-

partan aspekton en sia ekumena agado, ĉiuj kune sin reciproke riĉigas en la interŝanĝo de spertoj kaj en kunigado de laboro.

La tria ĉapitro donas kelkajn ekzemplojn de loka ekumena agado. Unue oni devas celi komunan partoprenon en preĝado por la paco, ekzemple, aŭ socia justeco, aŭ reciproka karitato, por danko, por helpalvoko, por espriimo de ĝojo, precipe en festoj, aŭ de pento, ktp. Oni memorigas, ke el la katolika flanko la partopreno en la sakramenta kulto estas regulita per la dekreto pri ekumenismo (n.8), per la Ekumena Direktivaro I (42-44, 55) kaj per la Instrukcio de 1972, krom per la noto publikigita en 1973 pri kelkaj apartaj kazoj.

Grava komuna agado rilatas la Biblion. En 1968 la "Universala Biblia Alianco" kaj la Sekretariato por Unuigo de Kristanoj publikigis komune "Direktivojn pri la interkonfesia kunlaboro en la traduko de la Biblio; kaj jam multaj el la 56 naciaj bibliaj societoj, laŭ ĉi tiuj principoj, kreis ĝis hodiaŭ 133 komisionojn pri traduko, distribuado aŭ studado de la Sanktaj Skriboj

Specifa laborkampo estas la animzorgo precipe ĉe hospitaloj, universitatoj, industrioj, karceroj, soldataro, radio kaj televido. Kaj ne malgrava sektoro estas tiu de interkonfesiaj geedziĝoj.

En la dokumento priparolata oni mencias ankaŭ kunan uzadon de porkultaj lokoj. Kvankam ĝenerala regulo postulas, ke ĉiu katolika preĝejo servu nur al katolika kulto, la "Ekumena Direktivaro" antaŭvidas apartajn kazojn, en kiuj neceso kaj karitato sugestas tiun reciprokan uzadon, kondiĉe, ke oni estu singardaj kontraŭ danĝero de indiferenteco.

Pri kuna agado por supera instruado, la Ekumena Direktivaro sustrekas plurajn eblecojn. Kelkloke jam ekzistas komunaj lernejoj, teologiaj fakultatoj, komunaj bibliotekoj; kelkfoje ankaŭ komunaj kursoj (laŭ la limoj

indikitaj en la Direktivaro) kaj eĉ komuna katekezo, kvankam pro kompreneblaj kialoj, tio estas unua devo ne diskutebla de ĉiu Eklezio aŭ eklezia komunumo. Ne malloftaj estas la kazoj de ekumenismaj kursoj, aŭ de studo pri alia religio aŭ eĉ de ekumena kunvivado dum kelka tempo.

Estas ankaŭ laŭdindaj ekzemploj de respektoplena uzado de komunikiloj kun religiaj programoj kaj de ĵurnaloj, kiuj estas pretaj doni al aliaj konfesioj spacon por informoj. En la kampo de la sanigado, aŭ okaze de naciaj aŭ internaciaj danĝeroj, por doni helpon en necesoj kaj suferoj, ĝenerale por sociaj problemoj, jam de longe kaj tre efike kunlaboras konfesioj diversaj, tiel ke montriĝas, ke ĉi tiu estas unu el la plej taŭgaj grundoj, kie oni povas labori kune en la nomo de Kristo. Oni starigis pro tio instituciojn por interŝanĝo de spertoj, por studo de la plej taŭgaj karitataj rimedoj en la spirito de la evangelio.

Pri ĉi tiu grava organiza afero estas dediĉitaj du ĉapitroj de la dokumento; dum en la lasta, pritraktanta la tiel diritajn spontanajn aŭ sendependajn movadojn, oni admonas, ke ili havu komunikiĝon kaj dialogon, fundamente gravajn por ĉiu ekumena celo, kaj submetiĝon al la loka episkopo.

LA BEZONO, LA DEVO, LA ĜOJO DE LA KRISTANA PREĜO

(Dum la ĝenerala aŭdienco de merkredo, la 30an de julio, la Sankta Patro, Paŭlo 6a, tiel vokis la atenton de la fideluloj al la bezono kaj al la devo de la kristana preĝo:)

Ni rigardas ankoraŭ al la resuma kaj fundamenta formulo de nia Sankta Jaro.

Ĝi nin devigas kaj samtempe nin rajtigas al esplorado pri ni mem, kiu poste devos etendiĝi al la ĉirkaŭa

socia kampo; kaj ĝi prezentas al ni fundamentan demandon: renovigi kion? Sankta Paŭlo respondas: "renovigu la spiriton, kiu konformigas vian mensostaton" (Ef. 4, 23). Nome, renovigu vian konceptadon pri la vivo, vi an manieron pensi, taksi la mondon, la aferojn, la vivon. Alivorte, ni devas alkutimiĝi, denove, se tio estas necesa, pensi kaj agi kristane.

Nia vivostatuto devenas de nia bapto, t.e. de la fakto, ke ni estas kristanoj, kaj ke, pere de la kredo, de la graco, de nia aparteno al la Eklezio, ni estas enigitaj en Jesuo Kristo; ni devas devenigi de ĉi tiu ĉefa fakto nian ekzistadan normon.

Esence, la kristanismo konsistasen ĉi tio: esti aŭtentikaj kristanoj. Kaj ĉi tiu aŭtentikeco esprimiĝas, ni tion bone scias, en la orientiĝo de nia vivo direkte al Dio, pere de Kristo, en la Sankta Spirito, kiu el Dio mem venas al ni, ĝuste kiam ni eniris en la sferon de nia sava plano.

Alia vorto fundamenta kaj resuma povas esprimi ĉi tiun novan kaj necesan formon de vivo: la amo, tiu amo, kiun ni nomas karitato, agapo, t.e. amo animita de Dio mem, kiu estas Amo; Amo, de kiu ni estas trapenetritaj, por ke ni kapablu ami kun formo, kun energio, kun celo supernaturaj. La karitato estas la novaĵo, estas la vero, estas la feliĉo, estas la facileco de la kristana vivo.

Ni volas pensi, ke vi ĉiuj, Fratoj kaj Filoj tre karaj, "pilgrimantoj de amo" al ĉi tiu Dio, kiu per la Jubileo reprenas sian lokon en la skalo de la valoroj, al kiu devas aspiri nia kristana vivo, la lokon plej altan, plej ordigan, plej deziratan, vi ĉiuj havas la kapablon rimarki, ke en vi mem troviĝas ĉi tiu unuaranga spirita sperto: la neceso, la bezono, la konsolo de la preĝo.

La religia esprimo, la preĝo, kiel parolo homa kaj superhoma, al la mistero de Dio, al la Realo de Dio,

naskiĝas ĝuste el la amo, el la karitato, kiam ĉi tiu, celebrante la Sanktan Jaron, ekbrulis en niaj koroj (vd. Rom. 5,5; II Kor.4,6; Ef.5,19; ktp.). Pri tio atentigas nin, kun la kutima simpleco kaj kun majstra certeco, Sankta Tomaso, kiam li memorigas al ni, ke la "motivo de la preĝado estas la deziro pri karitato, el kiu venas la preĝado" (S. Tom. II-II, 83,1 kaj 14).

Ĉi tie cent aferoj estus direndaj; sed sufiĉu unu, konata, sed tre firma por ni, kiuj konfirmis aŭ rekomencis nian vivigan kontakton kun Dio: tiu pri la graveco de la persona preĝado, por doni signifon, por doni ekvilibron, por doni forton al nia ekzisto.

Ni tion diras, pensante pri tendenco tre disvastigita en la moderna vivo: hodiaŭ, bedaŭrinde, multaj ne plu preĝas, tute ne preĝas.

Iam ne estis tiel. Eĉ personoj okupitaj en la profana vivo havis, almenaŭ kelkajn momentojn ĉiutage, kelkan tempon dum la festotagoj, por penso, konscia ago, interna momento de preĝado. Ĉiu infano estis kutimigita konsideri sia devo, kiel estas juste, adresi je la komenco kaj je la fino de ĉiu tago, alvokon al Dio vivanta, al la ĉiela Patro.

Hodiaŭ la lipoj de la moderna homo ŝajnas sigelitaj fare de supera senkonscio pri la religia ordo kaj de iluzia konscio, ke la realo, la tuta realo, estas tiu de la sentebla ordo, tiu de la sperto materia: la kontakto profesia, utilcela, scienca kun la aferoj de la profana mondo, kun la okupoj eksperimentaj kaj kun la sociaj rilatoj signas, por multaj, ensorbitaj de la laboro kaj de la studo, la limon de la homa intereso; doktrinoj pezaj kaj ekskluzivemaj, kiel tiuj de materiismo, praktike superis la totalan vidon de la ekzisto, limigante la scion en la sfero de la korpoj kaj de la fizikaj kaj kvantaj leĝoj, kaj subtenante la fatalan neceson, propran de la materio, kiel originan motoron de la estonteco de la na

turo kaj de la historio.

Tiel ekskluzivinte Dion, kiel transcendan Principon de la universo, kaj tial ekskluzivinte ĉiun lian liberan kaj saĝan intervenon en la mondon de nia eksperimentado, kiamaniere la homo povus adresi parolon al la nekonata Dio, provi kun li dialogon, petegi iun lian aman Providencon? La nenio, proklamita ĉe la supro de la universo, tuj reflektiĝas en la konscienco nekapabligita preĝi, kaj tuj strebanta fortikigi en si mistifikon de memsufiĉeco: la homo sufiĉus al si mem, sen turniĝo al rekono aŭ al alvoko de supera Fonto de la esto kaj de la estiĝo.

La malfacileco transpasi per la penso, senigita je spiritaj certecoj, la rondon de materialisma mondo, fariĝis pensmaniero teoria kaj praktika de l' moderna ateismo, al kiu nia antikva filozofio, t.e. nia tradicia religio, povas ja doni ankoraŭ hodiaŭ akcepteblan respondon; tamen kvazaŭ je ĝia helpo, ni vidas amasojn da junularo antaŭeniĝi por proklami per si mem la malplenon kreitan en la moderna spirito fare de la neado de Dio: tiu junularo antaŭeniras malgaje kaj turmentate de la neceso de aŭtentika religio, kiu ankoraŭ konsentu interparoli kun Dio, preĝi al li, scii lin alirebla kaj proksima, prizorgema kaj amema.

Tial ĉi tiu Sankta Jaro malfermos, ni esperas, sian pordon, malfermos sian lumon, malfermos sian koron por akcepti la filojn de la nova generacio serĉanta helpon liberigan kaj inspiran, serĉanta novan parolon, novan poezion, agnoskante la malfacilecon propran de la vera preĝo (vd. Rom. 8,26), kaj proprigante al si la belegan peton, kiun la Apostoloj en la Evangelio faras al la Majstro kaj Sinjoro Jesuo: "Instruu al ni preĝi!".

Estu ĉi tiu unu rekonkero de la Sankta Jaro: la bezono, la devo, la ĝojo de la kristana preĝo!

Kun nia apostola beno.

tr.C.M.-P.M.

El la Katolika Eklezio

BRAZILO - CUIABA' - 94jara, post preskaŭ 60 jaroj dediĉitaj al la misia vivo, mortis en Cuiabà (Matogro - sio), figuro, kiu inter la indianoj Bororos kaj Ksavantes fariĝis legenda: Maria Felipa Meskvita, laika misiistino, de ĉiuj konata kiel "la instruistino". Ŝia longa misia servo fariĝis mirinda pro la grandaj kaj daŭraj oferoj, kiujn ŝi grandanime akceptis por plenumi kristane karitatan agadon; sed ŝi ricevis multajn dankatestojn de la Indianoj, kiuj dum ŝia lasta malsano helpis sindone ŝin.

- NATAL - Bonegaj fruktoj estas konstateblaj el la tiel dirita kampanjo por la najbaraj rilatoj, enkondukita antaŭ du jaroj en la brazila ĉefdiocezo de Natal: 26 komunumoj tiucele starigitaj en la tuta regiono klopodas viziti la plej grandan nombron da personoj inter si proksimaj, kaj altiri ilin al renkontiĝoj kaj preĝkunvenoj. Tiamaniere oni interplektas reton da frataj rilatoj meze de la ĉefdiocezaj fideluloj.

- RIO-DE-JANEJRO - Pluraj miloj da personoj estas jam en Brazilo la partoprenantoj en konkurso pri Biblio, organizita ĉiumonate de la Patroj apartenantaj al la Kongregacio de la Sankta Koro. Pere de sia revuo la religiuloj proponas ĉiufoje tri seriojn po kvar demandoj pri difinitaj punktoj de la Nova Testamento. Inter tiuj, kiuj donas ekzaktajn respondojn estas lotitaj 20 personoj, al kiuj estos premie senditaj libroj taŭgaj por ilia aĝo kaj formado.

- SAN-PAŬLO - La Geknaburbo" (Meninopolis), fondita ĉe la periferio de San-Paŭlo en Brazilo de milana misiisto, celebris sian dudekkvinan jaron. Antaŭ kvarono da jarcento, la unua kerno de la "urbo" konsistis el lada tegmento kaj ludtereno. Nun la poreduka centro enhavas ĉiugradajn lernejojn, de nĝardeno al liceo, vizitatajn de 1500 studentoj. Laboras tie du sacerdotoj kaj 60 laikaj instruistoj.

BRITUJO - LONDONO - 500 delegitinoj el 7 milionoj 300 mil gvidistinoj kaj esploristinoj venintaj de ĉirkaŭ cent ŝtatoj havis ĉe universitato de Sussex la 22an Tutmondan Konferencon pri sia movado. En la renkontiĝo estis diskutita la problemo pri esploro de la kristanaj kaj moralaj valoroj de la aktuala mondo kaj pri la maniero per kiu la movado povas respondi efike al la postuloj de niatempa socio. Dum la konferenco la asocioj de tri landoj: Bahamoj, Indonezio kaj Maŭricio estis akceptitaj en la internacian movadon, kiu jam havis membrojn en 94 landoj.

La venonta tutmonda konferenco okazos en Teherano (Irano) dum 1978.

- FILIPINOJ - JARO - La dominikana ordeno ricevis ĉi jare en la Filipinaj insuloj riĉan floradon da vokiĝoj. En la novicejo de Jaro, fakte, eniris 23 junuloj el ĉiu parto de la lando. Tiu estas la plej alta nombro ĝis nun atingita en la historio de la filipina provinco. En Jaro oni devis pro tio plivastigi la novicejon.

FRANCUJO - AVINJONO - Preskaŭ 50 ĉevalrajdistoj alvenis pilgrime al Romo je la 30 de julio, startinte de Avinjono, trairinte surĉevale la sudon de Francujo kaj grandan parton de Italujo. Kune kun italaj rajdistoj, kiuj kuniĝis al ili, ili estis akceptitaj de la Papo.

HINDUJO - MADRAS - La Centro por karitata helpo al malriĉuloj de Madras atingis dek vivojarojn. Estis Don Mantovani, itala salezana misiisto, kiu fondis ĉi tiun Centron, donante al ĝi la bondeziran nomon: "La Beatecoj".

Ĉi tiu hodiaŭ flegas centojn da malsanuloj, donas kulturan kaj materian asiston al la loka loĝantaro, ĉefe al geknaboj. 700 el ĉi tiuj, fakte, vizitas la tajpan kaj stenografian lernejojn kunigitajn al la Centro. Sed la gemo - tiel dire - de la Centro, estas la "Leprula Kolonio", kiu je distanco de ĉirkaŭ 10 kilometroj, kuracas preskaŭ 400 personojn trafitajn per la Hansen-malsano, hinduojn, muzulmanojn kaj kristanojn.

La "Kolonio" estis la unua tiuspeca Centro por la leprula asisto en tiu regiono. Helpas por tiu kristana agado favore al lepruloj, la fratinoj de S. Karlo Borromeo, kongregacio deveninta el Belgujo.

- BOMBAJO - La lokaj civilaj aŭtoritatoj de Bombajo invitis la "Hindo-germanan societon por Sociaj Servoj" inkluzivigi en siaj helpaj programoj ankaŭ tiun teritorion, post kiam ili konstatis la fruktojn de la trijara programo kontraŭ malsato kaj malsanoj, planita por Mangaluro kaj por pluraj aliaj urbaj aŭ kamparaj regionoj. Hodiaŭ en la tuta Hindujo la centroj helpataj de tiu societo, kiu estas branĉo de la porasista asocio "Misereor" de la katolikaj germanoj, estas entute 37.

HISPANUJO - MADRIDO - Pli ol 277 milionoj da pesetoj (pli ol 2 miliardoj da italaj liroj) estis donacitaj de Hispanoj dum la 14a Kampanjo kontraŭ malsato en la mondo, enkondukita fare de la Virinoj de la Katolika Agado. La monsumo estas laŭ 35,7 procentoj pli alta ol tiu kolektita dum la antaŭa kampanjo. Ankaŭ ĉifoje la diocezo de Minorko donis plej abunde, proporcie al la loĝantaro.

ITALUJO - SPEZIA - Belan ateston de kredo donos la Junulara "Katolika Agado" de Spezia, kiu, pilgrimante laŭ la antikva maniero, iros piede de sia urbo ĝis placo S. Petro en Romo, trairante pli ol 400 kilometrojn. Forvojaĝante je 28 de julio ili atingos Romon je 10 de aŭgusto.

INDONEZIO - ENDE - La "Arnoldus Press" de la Verbitoj publikigis "La historio de la Eklezio en Indonezio", kvar-voluman verkon, pri kio kunlaboris multaj fakuloj, kaj skribitan en la indonezia nacia lingvo, la Bahasa.

La komencoj de la kristanismo en ĉi tiu lando datiĝas de la 7a jarcento. Estas nedubindaj pruvoj pri la ekzisto en tiu tempo de kristanaj komunumoj kaj de preĝejo dediĉita al la Madono en Barus, norde de Sumatro.

La unua volumo parolas pri ĉi tiuj komencoj kaj pri la misiista laboro, disvolviĝinta de la 14a ĝis la 18a jarcento. La dua volumo kondukas la leganton ĝis la 20a jarcento. La tria volumo, kiu entenas du partojn, prezentas la progreson de la Eklezio en la 20a jarcento, progreson, kiu konkretiĝis en 31 diocezoj kaj du milionoj kaj duono da hodiaŭaj katolikoj. La kvara volumo estas, fine, grandparte la traduko de nederlanda libro pri la indonezia Eklezio, publikigita en 1969 de d.ro M. P.M. Musken.

La kvar volumoj havas entute 2.800 paĝojn, kaj estas - kiel skribis kard. Darmojuwono, ĉefepiskopo de Semarang - grava efektivigo de la Eklezio en Indonezio.

IZRAELO - Pri historio de la franciskanaj misioj multe kaj plurfoje oni skribis. La nova verko de Bazilio Pandzic "Historia missionum Ordinis Fratrum Minorum" ĵus aperinta estas laŭtempe la lasta, kaj tiel ĝi eltiras profiton el ĉiuj antaŭaj studoj. Ĝi pritraktas la misiojn de la orientaj landoj; sed ni mencias el ĝi nur ion pri

la Sankta Lando, kio cetere, estas la ĉefa parto de la verko.

Du periodoj karakterizas ĝin: la unua, kiu iras de 1217 ĝis 1291; kaj la alia, kiu komenciĝas de 1333. En 1217 la ordeno de S. Francisko estis dividita laŭ 11re ligiaj teritorioj aŭ provincoj, unu el kiuj ampleksis la orientan bisancan teritorion, kaj nomiĝis transmara provinco. Sed la fratoj tien destinitaj sin direktis ne al Konstantinopolo sed al Palestino, la tero elektita de Kristo por lia surtera vivo kaj evangelizado; kaj pro tio ĝi estis nomata Sankta Lando. Ĝia unua provincestro estis frato Elio el Asizo. Probable Sankta Johano de Akri estis la unua tiea franciskana sidejo.

En 1219 la ĝenerala kapitulo de Asizo destinis pluajn fratojn al la Sankta Lando. En ĉi tiu cirkonstanco ankaŭ S. Francisko decidis forvojaĝi tien kun sia vikario Petro Cattani.

La transmara provinco, krom Palestinon, entenis Sirion, Grekujon kaj Cipron, kaj pro la tro grandaj distancoj estis dividita en la provincojn de Grekujo kaj de Sankta Lando.

La vivo de la misioj en Mezoriento sekvis grandparte la politikajn-militajn eventojn. Sed kiam la situacio renversiĝis, nur la franciskanoj restis por gardi la sanktajn lokojn kaj por estigi la evangelion per karitata servo al kristanoj kaj al nekristanoj. Multaj estas la menciindaj nomoj pli-malpli konataj; kaj ĉiuj, martirigitaj aŭ ne, estis fidelaj ĝisfine al Kristo kaj al la Eklezio. La verkinto, kun historiista senpartieco, memorigas iliajn farojn.

Konata estas la aktuala situacio. P. Pandzic havas kelkajn proponojn por ĝia estonteco. La Eklezio de la Sankta Lando estis dum jarcentoj la plej turmentata. La rajtoj de fratoj kaj de fideluloj ne ĉiam estis respektataj. El ĉi tio devenas la neceso de internacia statuto

por la sankta urbo, laŭ propono de la Papo. La ekumenismo jam progresinta devus ebligi superadon de mis - komprenoj kaj tensioj, kiuj en la pasinteco malfaciligis la rilatojn inter la diversaj konfesioj. Temas, cetere, pri akcepto de la plej altaj evangeliaj principoj kaj pri ilia konkreta aplikado.

Pri la aktiveco de la fratoj, sufiĉas konsideri la fervoron per kiu ili subtenis la kulton kaj kiel ili servas al la kristanaj komunumoj kaj eĉ al la alikonfesia loĝantaro. Notinda estas la scienca kontribuado por la kono de la sanktaj libroj kaj de la savhistorio per elfosadoj kaj bibliaj studoj. Rimarkinda ankaŭ estas la asisto al la pilgrimantaro per la Sankta-Landaj komisariejoj disi - gitaj preskaŭ ĉie.

LA SANKTA JARO, invitante la kristanaron reveni al la fonto de mizerikordo kaj de graco, donis eblecon al multaj kristanoj viziti krom Romo, ankaŭ la Sanktan Landon, kiu tiel vigle reeĥas en la korojn de la kredantoj la vortojn kaj instruadojn de Jesuo. Multaj grupoj efektive metis en la planon de sia pilgrimado ambaŭ sanktajn lokojn. La revuo "Terra Santa", zorgata de la Franciskanoj, havas ekde nun novan eldonon en la angla lingvo, kiu aldoniĝas al la aliaj en la franca, hispana, itala kaj araba.

IZRAELO - La Izraela registaro aboliciis la imposton pro forvojaĝo el la lando (250 usonaj dolaroj) al ĉiuj klerikoj, kiuj pilgrime celas Romon okaze de la Sankta Jaro, dum al la laikoj estas donata 50 procenta rabato Sed validas ankaŭ por la pilgrimantoj la limigoj, dekretitaj per la ĵusaj motivoj de monsevereco, fare de la re - gistaro, laŭ kiuj ne estas permesate forporti, por ĉiu vojaĝo al eksterlando, monon, laŭ valoro de pli ol 350 usonaj dolaroj.

KOLOMBIO - BOGOTO - Intensa programo pri renkontiĝoj laŭ tutkontinenta nivelo estis decidita dum la lasta kunveno okazinta en Bogoto, de la membroj de la latinamerika episkopa Konsilio (CELAM).

En aŭgusto disvolviĝos en Limo, Peruo, studkunveno pri sociaj konfliktoj kaj kristana aktiveco. Por la sekvaj monatoj estas planitaj tri renkontiĝoj dediĉitaj al la paŝtista uzado de socikomunikiloj: unu en Bogoto, koncerne la problemojn pri radio; la dua en Brazilo pri televido; la tria en Venezuelo pri gazetaro. Por decembro de la kuranta jaro estas antaŭvidita en Guayaquil - Ekvadoro - kunveno pri elmigradaj problemoj. La sekcio de CELAM por ekumenismo daŭrigos en ĉi tiu jaro siajn renkontiĝajn programojn pri latinamerikaj anglikanoj, kaj metodistoj.

MALAJZIO. - Okaze de la 123a datreveno en Singapuro de la unuaj "Piaristoj", ĉefministro Goh Keng Swee havis altajn laŭdojn por la katolika instruado, kiu faris grandajn servojn al la lando kontraŭ la dekadencaj formoj, kiuj endanĝerigas multajn aliajn popolojn. Ankaŭ al la ĉefepiskopo de Singapuro la ĉefministro esprimis dankon pro la granda kontribuado en la asisto de la miloj da forfuĝintoj el la Suda Vjetnamo.

LA KATOLIKA EKLEZIO EN PAKISTANO donas grandan impulson al sia agado por asisto kaj socia progreso, ĉefe pere de la institucio "Caritas Pakistan", kun ĝiaj diocezaj filioj, de karitataj organizoj, kiel "Catholic Social Services" kaj de tri porhelpaj entreprenoj. Krom tio, la Pontifikaj Misiaj Agadoj, ĉefe la Organizo por Disvastigo de la Kredo, donis gravajn helpojn, precipe okaze de la inundoj de ĉi tiuj lastaj jaroj.

Krom por ĉiutagaj agadoj aŭ por iliaj plibonigoj, rilatantaj centrojn profesiajn aŭ por instruado de plena-

ĝuloj, krom por la 17 hospitaloj kaj 24 ambulatorioj jam ekzistantaj en la lando, la Eklezio enkondukas serion da iniciatoj, ekde konstruado kaj riparo de loĝejoj ĝis konstruado de lernejoj, de laborcentroj, de hospitaloj kaj de multaj aliaj entreprenoj por homa progreso kaj socia asisto. La pakistana loĝantaro siaflanke kunlaboras per kontribuaĵoj, kiujn oni kolektas ĉefe dum karesmo, kaj per manlaboro.

PERUO. - LIMO - Estis ĵus eldonita en Limo traduko de la Evangelioj kaj de la Agoj de la Apostoloj en la kveku-an, la lingvon de la Inkanoj, ĝis nun parolatan de granda nombro da indiaj peruanoj. Ĉi tiu estas la unua tiuspeca traduko en la kveku-an.

La traduklaboro daŭris du jarojn kaj duonon kaj tiu de la presado unu jaron kaj duonon, ĉar oni kompostis por ĝi ĉiujn literojn. La traduko estis pretigita zorge de p. Demetr Molley, parokestro de Huancarama kaj de grupo da sacerdotoj, katekistoj kaj laikoj. La tradukistoj devis trairi vilaĝojn unu post la alia , por certiĝi ĉe la indianoj, ĉu tiu aŭ alia vorto estis ĝusta kaj facile komprenebla de ili. La verko havas 500 paĝojn kun 24 kolorbildoj kaj havas ankaŭ tradukon en la hispanan de mons. Henriko Palach y Fellu, episkopo de Abancay. La unua eldonkvanto estas de 6.000 ekzempleroj ; aparta volumo, ledobindita, estos donacita al Paŭlo 6a por la Vatikana Biblioteko.

POLLANDO. - Esperanto eniris porpastrajn seminariojn. La Katolika Esperanto-movado en Polujo fariĝas pli kaj pli konkera. Ĉiudimance okazas en kelkaj urboj esperantaj diservoj. Preskaŭ en ĉiu diocezo estas animzorgantoj pretaj servi en esperanta lingvo. Okazas ekumenaj renkontiĝoj. En Bielsko-Biala aperas eksterlandaj verdstelanoj-najbaroj. Samtempe kreskas la nombro de pastroj esperantistoj.

En la dioceza seminario de Tarnòw, ĉe Krakovo, instruas Esperanton P. J. Zielonka. Inter pluraj seminarioj ekzistas interŝanĝo de leteroj kaj libroj. Novaj pastroj esperantistoj estas bonvenaj. La novordinigitaj sacerdotoj M. Szostak kaj J. Koza el diocezo de Przemysl ricevis okaze de sia konsekro multajn samideanajn bondezirojn kaj reciprokis la gratulojn per memorigaj primic-bildetoj en esperanta lingvo.

Nia Redakcio esprimas al la novaj kunfratoj tre sincerajn vortojn de feliĉo kaj ĝojo.

- GNIEZO - En la 975a datreveno de la pola diocezo de Gniezo, disvolviĝis memorindaj festoj honore al S. Adalberto, ĝia patrono. Partoprenis en ili kun la kardinalo-primaso Stefano Wyszynski, pli ol 40 episkopoj de tiu lando kaj de aliaj nacioj. Estis reprezentitaj la Katolika Lublina Universitato kaj multaj polaj religiaj institutoj. Oni kalkulis partoprenon en tiuj festadoj de pli ol 60.000 personoj, inter kiuj amaso da studentoj el universitato kaj el ĉiuj lernejaj gradoj.

PRINCEJO DE MONAKO - Meze de tiom da grandaj pilgrimadoj el ĉiuj kontinentoj, menciindaj estas ankaŭ tri el la malgranda respubliko de Princlando de Monako kun kelkcent da kredantoj.

USONO - Novjorko - Oni kalkulas, ke en la tuta mondo ĉirkaŭ 3 - 4 milionoj da gejunuloj forfuĝas ĉiujare de si aj hejmoj aŭ estas forpelitaj de tiuj. Por savi ilin de perdiĝo, kiu estus ruino por ili kaj ankaŭ por la socio en kiu ili troviĝas, estiĝis antaŭ kelkaj jaroj en Novjorko religia entrepreno, nome la "Covenant House". Nur en 1974 pli ol 2.000 junuloj petis, ke oni akceptu ilin tie! La problemo de fuĝintoj estas problemo de gepatroj kaj de la socio - deklaras P. Bruce Ritter, la hodiaŭa direktoro.

Li kaj ĉiuj kunlaborantoj konscias, ke ili plenumas gravan evangelian taskon. Iom post iom la hejmo fariĝis pli ampleksa, por gastigi la ĉiam pli kreskantan nombron da helpopetantoj, kaj la servo estis pli zorge preparita: oni postulas personalon kun neordinaraj kvalitoj, oferdonan, kuraĝan kaj maturan, kapablan akcepti kiun ajn, ne haltantan antaŭ iu ajn problemo. Oni ne selektas petantojn, oni ne postulas tempolimojn por la loĝado. Se iu lito estas malplena, la unua knabo, kiu sin prezentas, okupos ĝin.

Komence, tio estas en 1970, nur volontuloj helpis; sed nun, post prilaborita programo, tuta serio da asistantoj, kuracistoj, fakuloj pri tia misiado, donas siajn servojn. Kun la legalizado de la entrepreno kaj kun la ŝtataj financaj helpoj, komenciĝis nova epoko por la "Covenant House", kiu povis malfermi novajn centrojn, kaj en 1973 ankaŭ unu por knabinoj, asistatan de religi aj fratinoj.

Por junuloj pli stabilaj oni kreis la "Grupan hejmon", kie ili povas vivi komunece kaj labori kune. Celo de la entrepreno estas unue savi vagantajn geknabojn el fizikaj kaj moralaj danĝeroj, redoni al ili la ekvilibron skuitan, prepari ilin al reeniĝo en la socion, kiel membrojn validajn kaj utilajn.

Ne estas statistike kalkuleblaj la fruktoj de ĉi tiu vere evangelia agado; sed la fervoro de ĉiuj kunlaborantoj kaj la reakiro de tiom da perdiĝemaj gejunuloj, montras videble, ke oni malkovris la ĝustan vejnon, kiu kaŝis la plej grandajn spiritajn trezorojn, por kies akiro Jesuo donis sin mem sur la kruco.

SANTOMEO - Okaze de proklamo de sendependeco de la insuloj Santomeo kaj Principo, kaj de la naskiĝo de la respektiva ŝtato, ankaŭ la Papo pere de la Stata Sekretario sendis al la ĉefepiskopo Mons. Manuel Nunes

Gabriel siajn salutojn kaj bondezirajn esprimojn.

La insuloj de Santomeo kaj Principo, kiuj nur unu semajnon post simila proklamo de la insularo de Verda Kabo atingis sendependecon, estas teritorio havanta 1000 kv. kilometrojn kun ĉirkaŭ 75.000 loĝantoj plejparte katolikaj. Ilia kristana vivo daŭras de pli ol kvar jarcentoj. Fakte jam de la unuaj grandaj geografiaj malkovroj kaj de misia disvastiĝo, en 1513 troviĝis en Santomeo episkopo kiel inspektoro de la loka Eklezio, dum en 1534 Paŭlo 3a starigis diocezon, kiu havis sian jurisdikcion sur vastaj regionoj de Afriko.

En la 18a jarcento Santomeo jam havis rimarkindan nombron da aŭtoktona klerikaro. Hodiaŭ la diocezo, kiu ampleksas nur la insularan teritorion, havas 12 parokojn kaj 33 kapelanejojn, komisiitajn al Klaretanoj; kun laboras kun ili por instruaj kaj sociaj agadoj "Flegistaj Franciskaninoj" kaj "Kanosaninoj de la Karitato".

EBURIO. - ABIGANO - Katekezo kaj liturgio estas la ĉefaj temoj diskutitaj ĉe la Episkopa Konferenco de Eburio en la plena asembleo. En liturgia kampo oni publikigis dokumenton pri aplikado de la reformo je paroka nivelo. La episkopa noto atentigas kontraŭ eblaj malcentriĝoj en la disvolvo de la ritoj. La episkopoj krome alfrontis la problemon de la administra kaj financa aŭtonomeco de iu juna loka virina Kongregacio: la Fratinoj de Nia Sinjorino de la Paco. La instituto, havanta hodiaŭ 11 religiulinojn kun ĉiamdaŭraj votoj, 57 kun portempa daŭro kaj 18 novicinojn, sin dediĉas al la evangelizado kaj al la evoluigado de la amasoj kamparaj kaj urbaj.

RVANDO. - KIGALO - Estinteco, nuntempo kaj estonteco estas la temo de paŝtista letero de la rvanda episkoparo okaze de la 75a datreveno de la alveno de la

unuaj misiistoj al la lando. La dokumento skizas historion pri ĉi tiuj tri kvaronoj da jarcento da intensa agado misiista kaj paŝtista. Poste ĝi pritraktas la nunan situacion de la Eklezio en Rvando, kun profunda esploro de la problemoj plej aktualaj kaj urĝaj. La lasta parto de la letero, fine, indikas la direktivojn de la estonta paŝtista agado kun aparta rilato al la kunlaborado inter civilaj kaj religiaj aŭtoritatoj, celanta la integran evoluon de la rvandanoj. La episkopoj, ĉe la konkludo de la dokumento, aŭguras, ke en la estonteco la homaj kaj moralaj valoroj de la kulturo de Rvando integriĝu en kristanismo renovigita kaj dinamisma kaj invitas la tutan popolon de Dio al grandanima kunlaboro interne de la Eklezio de Kristo.

ZAIRIO. - KINŜASO - Per enkonduko de la apostola Vic-nuncio en Zairio, mons. Antonetti, komenciĝis en la ĉefurbo la deka teologia Semajno de Kinŝaso, centrigita ĉe la temo "La evangelizado en la hodiaŭa Afriko". Montrinte sian laŭdon kaj sian kuraĝigon kaj al la organizintoj kaj al la preskaŭ 150 partoprenantoj, mons. Antonetti substrekis la gravecon de la temo, kiu revokas, li diris, tiun pritraktitan de la lasta Sinodo de la episkopoj kaj kiu konsistigos ankaŭ la temon ekzamenotan ĉe la Simpozio de la episkopaj Konferencoj de Afriko kaj Madagaskaro, enprogramigitaj en Romo por proksima septembro. Li poste esprimis siajn bondezirojn por la sukceso de ĉi tiu Simpozio, celanta profundigi tiujn, kiuj devos esti, en la estonteco, la ĉefaj karakterizoj de la evangeliza agado de la Eklezio en Afriko.

ETIOPIO. - ADISABEBO - Nunjare ekfunkcios la centro por formado de katekistoj en la apostola prefektejo de Avaso. La centro estos malfermita al la kandidatoj de la diocezoj de suda Etiopio. La tuto konsistas el la

preĝejo, la lernoĉambroj por la katekistoj kaj laborejoj por iliaj edzinoj; 16 domoj por samtiom da familioj kaj la loĝejoj por la sacerdotoj kaj la monakinoj zorgantaj pri la centro. La konstruado de la domoj estas financata de katolikaj organizaĵoj svisaj kaj germanaj. Direktoro de la Centro estas la nomita misiisto Patro Migliorati, kiu pretiĝis al sia tasko frekventante specialan kurson ĉe paŝtista instituto en Ugando.

ANGOLO - LUANDO - Inviton por preĝi senĉese por la paco en Angolo adresis la Episkoparo al ĉiuj sacerdotoj de tiu lando. La episkopoj, konklude de sia lasta ĝenerala kunveno en Luanda, interalie rekomendis al la klerikaro fari specialan preĝon por la paco dum la celebrado de ĉiu Meso, reciti la rozarion kun la celo petegi de la Madono la donon de la paco, kaj, fine, senĉese instigi la kristanajn komunumojn klopodi labori por la paco laŭ eblecoj por konstrui pli bonan Angolon.

ZAIRIO. - NAJROBO - En Afriko vivas pli ol 42 milionoj da katolikoj kaj 17.180 sacerdotoj, inkluzive de indiĝenoj kaj eksterlandanoj. En la ciferoj, entenataj en dokumentaro publikigita de la Asocio de la Episkopaj Konferencoj de Orienta Afriko, estas reliefigita, ke la plej granda nombro da katolikoj vivas en Zairio (proksimume 8 milionoj el 23 milionoj da loĝantoj), dum la plej malgranda katolika komunumo estas tiu de Somalio, kun 2.623 fideluloj el 3 milionoj da loĝantoj. Koncerne la klerikaron Zairio estas ankaŭ la lando kun la plej granda nombro da indiĝenaj sacerdotoj: 606 el 2.793, kaj kun la plej granda nombro da misiistoj: 2.187.